

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
tipografia edizioni **SAVIOLO** s.n.c. - Vercelli

Anno 92 - n. 1
GENNAIO-FEBBRAIO 2013

46^a Monda Tago de la PACO

1a de Januaro 2013

BEATI GLI OPERATORI DI PACE

(Mat. 5,9)

Il messaggio del Papa di quest'anno si articola in sette capitoli così sintetizzabili:

1) Dopo 50 anni dal Concilio Vaticano II è incoraggiante constatare che molti cristiani sono impegnati nell'annuncio della pace di Cristo. D'altro canto è allarmante la crescente disuguaglianza tra ricchi e poveri e la mentalità egoistica e individualistica, lo sregolato capitalismo finanziario. Pericolosi per la pace sono anche il fondamentalismo e il fanatismo, che stravolgono la vera natura della religione.

2) **La beatitudine evangelica.** Le beatitudini proclamate da Gesù non sono solo raccomandazioni morali, ma promesse rivolte a tutti. Gesù dichiara che ci si scoprirà figli di Dio non solo nella vita futura, ma già in questa. La pace è ad un tempo un dono messianico ed opera umana.

BEATAJ ESTAS LA PACIGANTOJ

(Mt. 5,9)

La ĉijara mesaĝo de la Papo disvolviĝas en sep ĉapitroj jene resumeblaj:

1) Post 50 jaroj de la Dua Vatikana Koncilio, estas kuraĝige konstati, ke multaj kristanoj estas engaĝitaj en la anonco de la paco de Kristo. Aliflanke maltrankviligas la kresko de la malegaleco inter riĉuloj kaj malriĉuloj, de la individuisma kaj egoisma pensmaniero, de la senregula financa kapitalismo. Danĝeraj por la paco estas ankaŭ la fundamentismo kaj la fanatikeco, kiuj renversas la veran naturon de la religio.

2) **La evangelia beatecononco.** La beatecoj anoncitaj de Jesuo, ne estas nur moralaj rekomendoj, sed promesoj adresitaj al ĉiuj. Jesuo deklaras, ke oni sin malkovros filioj de Dio ne nur en la estonta vivo, sed jam en ĉi tiu. La paco estas samtempe mesia donaco kaj homa faritaĵo.



Precondizione a ciò è lo smantellamento della dittatura del relativismo che non riconosce alcuna legge morale naturale.

3) La pace: dono di Dio e opera dell'uomo. La pace concerne l'integrità della persona umana. Si basa sulla verità, la libertà, l'amore e la giustizia. Per diventare veri operatori di pace è necessario un costante dialogo con Dio. Solo così l'uomo può vincere il peccato in tutte le sue forme e sentire come propri i bisogni degli altri.

4) Operatori di pace sono coloro che amano, difendono e promuovono la vita nella sua integralità. È necessario innanzitutto il rispetto della vita umana in tutti i suoi aspetti, dal concepimento, nel suo svilupparsi, fino alla sua conclusione naturale. Si deve proteggere la vita dei più deboli a partire dal nascituro. D'altra parte si deve riconoscere e proteggere la naturale struttura del matrimonio come unione di un uomo e di una donna. Ognuno abbia il diritto di testimoniare liberamente la propria religione e di sostenere sé e la sua famiglia con un lavoro dignitoso.

5) Costruire il bene della pace mediante un nuovo modello di sviluppo e di economia. Lo sviluppo sia integrale, solidale e sostenibile. Lo sviluppo economico rinunci alla ricerca del massimo profitto e consumo, ma si basi sulla ricerca del bene comune delle attuali e future generazioni.

6) Educazione per una cultura di pace: il ruolo della famiglia e delle istituzioni. Si deve salvaguardare il diritto dei genitori all'educazione religiosa e morale dei figli. È richiesto alle istituzioni culturali un notevole contributo alla formazione di nuove generazioni di leader e al rinnovamento delle pubbliche istituzioni.

7) Una pedagogia dell'operatore di pace. Si devono educare gli uomini ad un reciproco amore, alla pace, al perdono, alla benevolenza più che alla tolleranza, a vincere il male con il bene. Dobbiamo chiedere a Dio che ci faccia strumenti della sua pace.

Antaŭkondiĉo al tio estas la forigo de la diktaturo de la relativismo, kiu rekonas nenian naturan moralan leĝon.

3) La paco: donaco de Dio kaj homa verko. La paco koncernas la tutan homan persono. Ĝi baziĝas sur la vero, la libero, la amo kaj la justeco. Por fariĝi vera pac-operacianto nepre necesas konstanta dialogo kun Dio. Nur tiamaniere la homo povas venki la pekon en ĉiuj ĝiaj formoj kaj senti kiel siajn la bezonojn de la aliaj.

4) Pacagantoj estas tiuj, kiuj defendas, kaj antaŭenigas la vivon en ĝia pleneco. Nepras unue la respekto pri la homa vivo, en ĉiuj ĝiaj aspektoj, de la koncipiĝo, dum ĝia evoluo, ĝis ĝia natura konkludo. Oni devas precipe protekti la vivon de la plej malfortuloj, komencante de la naskiĝontoj. Aliflanke oni devas rekoni kaj protekti la naturan strukturon de la geedziĝo kiel unuigi de viro kaj virino. Ĉiuj devas rajti atesti libere sian religion kaj subteni sin kaj sian familion per laboro digne homa.

5) Konstrui la bonon de la paco per novaj modeloj de evoluo kaj ekonomio. La socia evoluo estu ĉionentena, solidara kaj eltenebla. La ekonomia evoluo forlasu la serĉadon de la maksimumigo de la profito kaj de la konsumado, sed baziĝu sur la strebo al la komuna bono de la nunaj kaj estontaj generacioj.

6) Edukado al la pakulturo: la roloj de la familio kaj de la institucioj. Oni devas protekti la rajton de la gepatroj al la edukado religia kaj morala de la filoj. De la kulturaj institucioj estas petata rimarkebla kontribuo en la formado de novaj generacioj de estraranoj kaj en la renovigo de la publikaj institucioj.

7) Pedagogio por la pacagantoj. Oni devas eduki la homojn al la reciproka amo, al la paco, al la pardono, al bonvolemo pli ol al simpla toleremo, venki la malbonon per la bono. Ni devas peti al Dio, ke li faru el ni ilojn de lia paco.

Settimana di preghiera per l'Unità dei Cristiani (18-25 gennaio 2013)

“Quel che il Signore esige da noi”

(Michea 6,6-8)

Ogni anno dal 18 al 25 gennaio, cioè tra le ricorrenze della “Cattedra di Pietro” (o della “Confessione di Pietro” per i protestanti) e quella della “Conversione di San Paolo”, si celebra in tutte le comunità cristiane l'ottava di preghiera per l'unità dei Cristiani. Questa celebrazione, che si ripete ogni anno ormai da più di un secolo, vede cristiani cattolici, ortodossi e protestanti uniti in una comune preghiera per l'unità.

Il tema scelto per quest'anno è preso dal profeta Michea: *“Quale offerta porteremo al Signore, al*

Dio Altissimo, quando andremo ad adorarlo? Gli offriremo in sacrificio vitelli, di un anno? Gradirà il Signore migliaia di montoni e torrenti di olio? Gli daremo in sacrificio i nostri figli, i nostri primogeniti per ricevere il perdono dei nostri peccati?

In realtà il Signore ha insegnato agli uomini quel che è bene, quel che esige da noi: praticare la giustizia, ricercare la bontà e vivere con umiltà davanti al nostro Dio”.

Preğ-semajno por la Unuigo de la Kristanoj (18-25a de Januaro 2013)

“Tio, kion la Sinjoro postulas de ni ”

(Miĥa 6,6-8)

Ĉiujare, de la 18a ĝis la 25a de Januaro, t.e. inter la festotagoj de la “Katedro de Petro” (aŭ de la “Konfeso de Petro”, laŭ la protestantoj) kaj tiu de la “Konvertiĝo de Sankta Paŭlo”, oni celebras en ĉiuj kristanaj komunumoj, tagokon da preĝoj por la unuigo de la Kristanoj. Ĉi tiu celebrado, kiu ripetiĝas jam de pli ol unu jarcento, arigas kristanojn katolikajn, ortodoksajn kaj protestantajn en komuna preĝado por la unuigo.

La temo de la ĉijara preĝado estas prenita el la profeto Miĥa:

“Kian oferon ni portos al la Sinjoro, al la plejalta Dio, kiam ni iros kliniĝi antaŭ Li? Ĉu ni oferos al li unujarajn bovidojn? Ĉu la Sinjoro ŝatos milojn da virŝafoj kaj torentojn da oleo? Ĉu ni donu kiel oferon niajn unue-naskitojn por ricevi la pardonon de niaj pekoj?

Verdire la Sinjoro instruis al la homoj tion, kio estas bono, tion, kion li postulas de ni: nur praktiki la justecon, serĉadi la bonfarojn, kaj vivi en humileco antaŭ nia Dio”.



Il Consiglio Ecumenico delle Chiese e il Pontificio Consiglio per l'Unità dei Cristiani hanno affidato ai cristiani dell'India la preparazione dei testi per la Settimana di preghiera per l'unità dei cristiani del 2013.

Il tema scelto dai cristiani dell'India riguarda le discriminazioni subite dai *dalit* – i cosiddetti «fuori casta» – nel contesto della società indiana, ma anche all'interno delle comunità cristiane. La Settimana propone, dunque, un profondo esame di coscienza sulla negazione di diritti e dignità ad interi gruppi sociali, non solo in India. Da qui la scelta del testo del profeta Michea.

Al tempo di Michea il popolo di Dio doveva affrontare l'oppressione e l'ingiustizia di coloro che intendevano negare la dignità e i diritti dei poveri.

Lo sfruttamento dei poveri era - ed è - un fatto reale:

“Voi divorate il mio popolo. Lo spellate, gli rompete le ossa”, così diceva il profeta.

In modo simile, oggi, il sistema delle caste, che in tanti paesi assumono nomi diversi, con il razzismo e il nazionalismo compromettono gravemente la pace nei popoli.

Michea mette in evidenza il rigetto di rituali impoveriti dalla mancanza di misericordia, di umiltà e di giustizia e dimostra qual'è la vera aspettativa di Dio sulla via della giustizia e della pace.

La Ekumena Konsilio de la Eklezioj kaj la Papa Konsilio por la Unuiĝo de la Kristanoj konfidis al la kristanoj de Hindujo la pretigo de la tekstoj por la preĝsemajno por la unuiĝo de la kristanoj 2013.

La temo elektita de la hindaj kristanoj rilatas la diskriminaciojn suferitajn de la *dalitoj* – la tielnomataj «eksterkastuloj» – en la hinda societo, sed ankaŭ ene de la kristanaj komunumoj. La Semajno proponas, do, profundan konsienc-ekzamenon pri la forigo de rajtoj kaj de la digno de tutaj sociaj grupoj, ne nur en Hindujo.

Pro tio oni elektis la teksto de profeto Miĥa.


En la tempo de Miĥa, la popolo de Dio devis alfronti la subpremon kaj la maljustecon de tiuj, kiuj malagnoskis la dignon kaj la rajtojn de la malriĉuloj.

La ekspluatado de la malriĉuloj estis - kaj estas -

realaĵo: *“Vi voras mian popolon. Vi lin senhauĝigas, dispecigas liajn ostojn”* tiel diris la profeto.

Sammaniere, hodiaŭ, la kasto-sistemo, kiu en pluraj landoj estas alimaniere nomata, kun la raciismo kaj la naciismo endanĝerigas serioze la pacon ene de la popoloj.

Miĥa elmontras la malakcepton de ritarioj malriĉigitaj de la malĉeesto de mizerikordo, de humileco kaj de justeco, kaj montras kian estas la vera atendo de Dio sur la vojo de la justeco kaj de la paco.





MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

DISINSERIRE IL FRENO DEL PASSATO

Spesso il nostro viaggiare in questo mondo assomiglia a quell'autista che si lamenta in continuità dell'automezzo e non si preoccupa di disinserire il freno a mano. Convinto di meritare di più, continua a ripetere: «Come mai non va? L'ho pagata cara e mi cammina come una lumaca».

Ricordiamo il proverbio che dice: «*Neanche l'asino muove la coda per niente*». Infatti, quando facciamo del bene a qualcuno oppure subiamo un'offesa, noi aspettiamo che ci sia dovuta una ricompensa. Come ogni respiro prevede un'entrata dopo ogni uscita, pena la vita, così anche noi, «*ogni volta che esce da noi qualcosa, abbiamo un bisogno assoluto che rientri in noi almeno l'equivalente, e siccome ne abbiamo bisogno, crediamo di averne il diritto*» (S. Weil, A proposito del Pater).

Dopo tutto quello che ci è successo nella vita, dopo tutto il bene che abbiamo fatto verso le persone e il creato, pensiamo sempre di avere dei crediti ovunque. Chi saranno i nostri debitori? Nostri debitori sono tutte le persone, tutte le cose: in breve, l'universo intero. Proprio a tutto questo ci viene chiesto di rinunciare quando, nella preghiera del Signore, andiamo a dire: «*E rimetti a noi i nostri debiti, come noi li rimettiamo ai nostri debitori*» (Mt. 6,12).

Se vogliamo puntualizzare meglio il significato dell'espressione, bisognerebbe tradurre: «*Rimettici i nostri debiti come*

MALSTREĈI LA BREMSON DE LA PASINTECO

Ofte nia vojaĝado en ĉi tiu mondo similas al tiu ŝoforo, kiu daŭre plendas pro la veturilo kaj li ne zorgas malstreĉi la manbremson. Konvinkite ke li meritis pli multe, li senĉese ripetas: «Kial do ĝi ne rapidas? Mi pagis ĝin kare kaj ĝi marŝas kiel testudo».

Ni memoru la proverbon, kiu diras: «*Eĉ la azeno ne movas la voston nenial*». Fakte, kiam ni bone agas favore de iu, aŭ ni suferas ofendon, ni supozas, ke al ni oni ŝuldas rekompencan. Kiel en ĉiu spiro necesas eniro post ĉiu eliro, sub mortminaco, tiel ankaŭ ni, «*ĉiufoje ke io eliras el ni, ni nepre bezonas, ke en nin reeniru almenaŭ la sama kvanto, kaj pro tio, ke ni bezonas ĝin, ni supozas ke ni rajtas je ĝi*» (S. Weil, Koncerne la "Patro nia").

Sekve de ĉio okazinta al ni en la vivo, sekve de ĉiu bono, kiun ni faris al la homoj kaj al la kreitaro, ni ĉiam pensas havi kreditojn ĉie ajn. Kiuj estus niaj ŝuldantoj? Niaj ŝuldantoj estas ĉiuj personoj, ĉiuj aĵoj: mallonge, la tuta universo. Oni petas, ke ni tute rezignu ĝuste ĉion ĉi, kiam en la preĝo de la Sinjoro ni diradas: «*Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj*» (Mt. 6,12).

Se ni volas pli bone precizigi la signifon de la esprimo, oni devus traduki: «*Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel*

anche noi li abbiamo rimessi ai nostri debitori». In altre parole, la rinuncia ai nostri crediti, viene prima del perdono di Dio, in quanto lo condiziona. Infatti, Dio stesso non ha il potere di perdonare il male che è in noi mentre siamo legati al nostro passato, ai diritti (o crediti) che pensiamo di avere. Rinunciare a tutto il nostro passato, dimenticare perfino il bene che pensiamo di aver fatto, ci permette di vivere nella libertà più bella ed esaltante, quella di accogliere l'avvenire senza legami con il passato e totalmente aperti a Dio e alla sua volontà.


Fra mille applicazioni possibili, noi esperantisti possiamo riflettere sul valore di saper prendere le dovute distanze dalle varie lingue nazionali e locali per disporci il più possibile ad accogliere ogni occasione, opportuna e non opportuna, in vista di quel progetto di comunione piena fra tutti i popoli, a prescindere dalla razza e dal linguaggio. Condizione irrinunciabile per accogliere l'avvenire nella piena creatività e libertà, senza favoritismi di sorta e senza ambiguità, è rinunciare di arroccarsi sulla propria lingua, non coccolarsi con il proprio dialetto.

Con questa preghiera possiamo esprimere il desiderio di non essere condizionati dalle conquiste del passato anche recente, ma e di mettere al primo posto il progetto che Dio ha su di noi, oggi: essere un cuore solo e un'anima sola, in uno scambio immediato e fiducioso con tutti, mediante lo stesso linguaggio dell'amore e dell'intesa. In altre parole: disinserire il freno del passato per essere decisamente orientati verso l'avvenire che Dio da sempre ha progettato per noi.

ankaŭ ni pardonis al niaj ŝuldantoj». Alivorte, la rezigno pri niaj kreditoj, antaŭas la pardonon de Dio, ĉar tiu kondiĉas ĉi tiun. Fakte, Dio mem ne povas pardonis la malbonon, kiu estas en ni, dum ni estas ligataj al niaj pasintaĵoj, al la rajtoj (aŭ kreditoj), kiujn ni pensas havi. Tute rezigni niajn pasintaĵojn, eĉ forgesi la bonon, kiun ni taksas de ni farita, permesas al ni vivi en la plej bela kaj ekzaltanta libereco, tio estas, akcepti la estontecon sen ligiloj kun la pasinteco kaj tute malfermitaj al Dio kaj al lia volo.

Inter miloj da eblaj aplikoj, ni esperantistoj povas prikonsideri la valoron preni la oportunajn distancojn de la diversaj naciaj kaj lokaj lingvoj por pretiĝi akcepti ĉiun ŝancon, oportunan aŭ neoportunan, antaŭvidante tiun planon de komuneco inter ĉiuj popoloj, senkonsidere pri la raso kaj la idiomo. Nerezignebla kondiĉo por akcepti la estontecon en plena kreemo kaj libereco, sen ajn favorismoj kaj sen ambigueco, estas rezigni sin kuntiriĝi en la propra lingvo, ne dorlotiĝi en sia dialekto.

Per tiu ĉi preĝo ni povas esprimi la deziron ne esti kondiĉitaj de la konkeroj de la pasinteco ankaŭ proksima, sed meti en la unuan lokon la projekton, kiun Dio havas pri ni, hodiaŭ: kunesti samkore kaj samanime, en senpera kaj konfidema interŝanĝo inter ĉiuj, per la sama lingvo de amo kaj interkonsento. Alivorte: malstreĉi la bremson de la pasinteco por esti senhezite orientataj al la estonteco, kiun Dio de ĉiam projektis por ni.



Dirite inter ni ...



013

EN LA OFICEJO

- Bonan matenon!
- Bonan matenon, Tereza.
- Ĉu mi alvenis malfrue?
- Ne, estas mi, kiu venas ĉiam frue.
- Mi vidas, ke vi jam komencis labori.
- Certe, mi venis frue, ĉar ni havas multon por fari, hodiaŭ.
- Ĉu vi enigis multajn datumojn en la komputilon?
- Ne, mi nur klopodis kolekti ilin racie.
- Sed hieraŭ vespere la informoj estis jam bone ordigitaj.
- Vi pravas, tamen, post via foriro, aliaj telefonvokoj aliigis la situacion.
- Ĉiam estas malfruemuloj.
- Oni devas trovi rimedon al tio.
- Ni devas ĉiam esti afablaj kun nia klientaro.
- Tio estas vera, sed kelkfoje...
- Kelkfoje?...
- Nu, ni ne diskutu nun pri tio.
- Vi pravas: en ĉi tiu momento diskutado estus nur tempo-malŝparo.
- Kaj malŝparotan tempon ni ja ne havas.
- Kion mi faru?
- Nu, antaŭ ĉio demetu vian mansaketon.

IN UFFICIO

- Buon giorno (mattino)!
- Buon giorno, Teresa.
- Sono arrivata tardi?
- No, sono io che arrivo sempre presto.
- Vedo che ha già incominciato a lavorare.
- Certamente, sono venuto presto, perché oggi abbiamo molto da fare .
- Ha inserito molti dati in computer?
- No, ho solamente cercato di raccogliarli con logica.
- Ma ieri sera le informazioni erano già ben ordinate.
- Ha ragione, tuttavia, dopo che se ne è andata, altre telefonate hanno cambiato la situazione.
- Ci sono sempre dei ritardatari.
- A questo si dovrebbe trovare una soluzione.
- Dobbiamo essere sempre cortesi con la nostra clientela.
- Questo è vero, ma qualche volta...
- Qualche volta?...
- Su, non facciamo adesso una discussione su questo.
- Ha ragione: in questo momento una discussione sarebbe solamente una perdita di tempo.
- E tempo da perdere non ne abbiamo certamente.
- Che cosa devo fare?
- Beh, prima di tutto appoggi la sua borsetta.

- Farite.
- Nun ni rigardu kune ci paperaĉojn.
- Jen, mi povus komenci enkomputiligi la unuan liston.
- Jes, tion vi povus fari
- Donu ĝin al mi.
- Atentu, kontrolu antaŭe, ĉu iu el la nomoj jam enestas.
- Neniu devus jam enesti.
- Tamen, estas pli bone ĉiam kontroli.
- Tion ni povus fari poste.
- Eble vi pravus, ĉar la ordino perkomputila estas pli rapida.
- Kaj kiam multaj nomoj estas prikonsideritaj, estas oportune doni tiun taskon al nia... amiko
- Nu, mi konstatas, ke ĉi tie ni laboras triope.
- Jes, sed la tria estas pasiva.
- Ĝi estas tamen la plej rapida.
- La plej rapida, se ĝi ricevas puŝon.
- Jes, oni devas nur puŝi ion, kaj jen ĉio aperas.
- Kiam estas elektra kurento.
- Mi esperas, ke ĉi matenon ĝi ne mankos.
- Ankaŭ mi.
- Tamen, estus pli bone se de tempo al tempo vi konservus vian laboron.
- Memkompreneble, mi jam suferis malbonajn spertojn.
- Jes, mi memoras, kiam vi devis retajpi dekon da paĝoj.
- Mi tro multe enfervoriĝis, kaj mi ne pensis, ke povus manki la elektra kurento.
- Kiu eraras, tiu lernas.
- Kaj agas konsekvence.
- Kaj nun, ek, al laboro.
- Al la laboro!
- Fatto.
- Ora guardiamo insieme queste cartacce.
- Sì, potrei incominciare ad inserire in computer la prima lista.
- Sì, potrebbe farlo.
- Me la dia.
- Attenta, prima controlla se qualche nome è già dentro.
- Non ce ne dovrebbe essere nessuno.
- Tuttavia, e sempre meglio controllare.
- Lo potremmo fare dopo.
- Forse ha ragione, perché l'ordinamento con il computer è più veloce.
- E quando si devono prendere in considerazione molti nomi, è opportuno darne il compito al nostro... amico.
- Beh, faccio una constatazione, che qui lavoriamo in tre.
- Sì, ma il terzo è passivo.
- È tuttavia il più veloce.
- Il più veloce, se riceve un impulso.
- Sì, si deve solamente premere qualcosa, ed ecco che appare tutto.
- Quando c'è la corrente elettrica.
- Spero che stamattina non mancherà.
- Anch'io.
- Tuttavia, sarebbe meglio se di tanto in tanto salvi il suo lavoro.
- Certamente, ho già sofferto di brutte esperienze.
- Sì, mi ricordo di quando dovette ridigitare una decina di pagine.
- Mi ero immedesimata troppo, e non avevo pensato che sarebbe potuta mancare la corrente elettrica.
- Chi sbaglia, impara.
- E agisce di conseguenza
- E adesso, avanti, al lavoro.
- Al lavoro!

- Jen, ĉi tio estas farita.
- Ĉu ĝi estas en ordo?
- Nu, mi finfaris ĝin, sed estus oportune kondukti kiel kutime.
- Tio signifas, ke vi sugestas, ke ni kune rekontrolu la laboron.
- Por esti pli certaj pri ĝia boneco.
- Vi pravas. Pli bone kontroli kvarokule ol duokule.
- Jes, kvar okuloj pli bone vidas ol du.
- Kaj vi diras, ke mi ĉiam trovas ian neperfektaĵon.
- Vi estas la ĉefo: vi havas rajton al kritiko.
- Jes, vi pravas, sed mi ĉiam ŝatas la kunlaboron de la aliaj.
- Pro tio mi sugestis, ke ni kune kontroli la tuton.
- Nu, tion ni faros, sed ne tuj.
- Kial?
- Ĉar nun mi devas fari telefonvokon.
- Ha, vi pravas, jam estas la horo!
- Ĉu vi vidas? Mi estas pli lerta ol mia sekretariino.
- Vi nur anticipis min je du minutoj.
- Ĉu post du minutoj vi estus dirinta al mi, pri la telefonvoko?
- Certe.
- Kaj kiamaniere vi estus memorinta pri ĝi?
- Mi fruktuzas la modernajn rimedojn.
- Tio estas?
- La trilon de mia vek-horloĝo.
- Kaj vi diras, ke vi utiligas la modernajn rimedojn!?
- Jes, tion mi diras.

- Ecco, questo è fatto.
- È a posto?
- Beh, io l'ho finito, ma sarebbe opportuno fare come al solito.
- Questo significa che lei suggerisce che ricontrolliamo insieme il lavoro.
- Per essere più sicuri della sua bontà.
- Ha ragione, meglio controllare con quattro occhi anziché con due occhi.
- Sì, quattro occhi vedono meglio di due.
- E lei dice che io trovo sempre qualche imperfezione.
- Lei è il capo: lei ha il diritto di criticare.
- Sì, ha ragione, ma io apprezzo sempre la collaborazione degli altri.
- Per questo ho suggerito di controllare insieme tutto quanto.
- Lo faremo, ma non subito.
- Perché?
- Perché adesso devo fare una chiamata telefonica.
- Sì, ha ragione: è già l'ora!
- Vede? Son più bravo della mia segretaria.
- Mi ha solamente anticipato di due minuti.
- Fra due minuti mi avrebbe detto della telefonata?
- Certamente.
- Ed in che maniera se ne sarebbe ricordata?
- Sfrutto i mezzi moderni.
- Cioè?
- La suoneria della mia sveglia.
- E dice di utilizzare i mezzi moderni!?
- Sì, lo dico.

- Sed vian vekhorloĝon vi aĉetis ĉe vendisto de antikvaj meblo-ornaĵoj.
 - Ĝi al mi placas.
 - Pri tio mi konsentas.
 - Kaj manke de aliaj rimedoj, mi utiligas ĝin.
 - Oni povus fari ion pere de la komputilo.
 - Jes, oni povus antaŭvidi programon, kiu eligas je la ĝusta horo mildan voĉon kun la informo, ke oni devas fari tion kaj tion.
 - Oni povas pensi pri io tia.

 - Vi ĉiam pretas kapti la okazojn.

 - Nu, ni pensu pri la telefono.
 - Ha, jen, mia vekhorloĝo sonoras.
 - Malnova sed efika.
 - Kiel la posedantino.
 - Jes, nur en la senco, ke vi bone funkcias, kaj ne, ke vi estas maljuna.
 - Dankon.
 - Ni nun telefonos al la Kanariaj Insuloj.
 - Jes, mi jam havas la telefon-numeron sur mia skribotablo.
 - Bone, tuj voku ĝin.
 - Ĉu mi petu rekte pri Sinjoro Perez?

 - Jes, petu rekte pri li.
 - Kaj se li ne ĉeestas?
 - Neeblas, li atendas mian telefonvokon.
 - Nu, bone, mi vokos lin.
 - Poste paroligu min sur la dua linio.

 - Certe, kiel kutime.
 - Dankon.
- Ma la sua sveglia l'ha comperata da un rivenditore di antiche suppellettili.
 - Mi piace.
 - Sono d'accordo.
 - Ed in mancanza di altri mezzi, la utilizzo.
 - Si potrebbe fare qualcosa con il computer.
 - Sì, si potrebbe prevedere un programma che emetta all'ora giusta una voce gentile con l'informazione che si deve fare questo e quello.
 - Si potrebbe pensare a qualcosa di questo tipo.
 - È sempre pronto ad afferrare le occasioni.
 - Ebbene, pensiamo al telefono.
 - Ah, ecco, la mia sveglia suona.
 - Vecchia ma efficiente.
 - Come colei che la possiede.
 - Sì, solamente nel senso che è ben efficiente, e non che è vecchia.
 - Grazie.
 - Adesso telefoniamo alle isole Canarie.
 - Sì, ho già il numero telefonico sulla mia scrivania.
 - Bene, lo chiami subito.
 - Devo chiedere direttamente del Sig. Perez?
 - Sì, chieda direttamente di lui.
 - E se non c'è?
 - Non è possibile, aspetta la mia chiamata.
 - Bene, lo chiamo.
 - Poi mi faccia parlare sulla seconda linea.
 - Certo, come al solito.
 - Grazie.

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

QUANDO T'INCONTRERÒ KIAM MI RENKONTOS VIN

*Quando mi vorrai
io verrò.*

*Si aprirà il bianco cancello
e a me dinnanzi
il grande viale,
in cima al quale
dall'alto Tuo scalone,
mi aspetterai
in veste di luce.*

*Mi accorgerò allora
di non essere più bella
per sedurti.*

*Sarò un po' vecchietta,
procederò forse
titubante ed incerta,
e Tu sorriderai...*

*E quando Ti sarò vicina
mi dirai: "va bene..."*

*E mi farai una carezza al viso
come la mamma
quand'ero bambina...
E mi farai cenno di sedermi.*

*E io mi siederò ai Tuoi piedi,
mi stringerò ad una Tua caviglia,
ed alzerò il capo, reclinato,
per guardarTi, felice
di sentire le Tue dita
sfiorare i miei bianchi capelli.*



*Kiam Vi volos min
mi venos.*

*Malfermiĝos la blanka kadro
kaj antaŭ mi
la granda aleo,
ĉe kies supro
de l' alta Via ŝtuparego
Vi atendos min
en vesto de lumo.*

*Mi tiam ekrimarkos
ke mi ne plu estas bela
por Vin allogi.*

*Mi, iom maljuneta,
antaŭeniros eble
hezitema kaj necerta,
kaj Vi ekridetos...*

*Kaj kiam mi estos apud Vi
Vi al mi diros: "nu, bone..."*

*Kaj Vi faros kareson al mia vizaĝo
kiel la patrino
kiam mi estis infana...
Kaj Vi kapsignos, ke mi sidiĝu.*

*Kaj mi sidiĝos ĉe Viaj piedoj,
mi alkroĉiĝos al Via piedartiko,
kaj mi levos la kapon, klinita,
por Vin rigardi, feliĉa
sentante ke Viaj fingroj
tuŝetas miajn blankajn harojn.*

Anna Amorelli Gennaro


(esperantigis Norma Cescotti)

Auguri Natalizi Kristnaskajn Bondezirojn

In occasione del Santo Natale, il nostro assistente Ecclesiastico ci invia una breve meditazione.

Okaze de la Sankta Kristnasko nia Eklezia Asistanto sendas al ni mallongan meditaĵon.

*“Per Dio
l’uomo
è
il trionfo e la sfida della creazione;
ne è al tempo stesso
inquieto e fiero.
Dalla culla alla tomba,
la vita
è un cammino
che soltanto l’uomo può allietare
o
rendere arido.
È un laboratorio
di idee, di sogni, di esperienze
e dipende soltanto da lui
trarne le lezioni
che gli permetteranno
di elevarsi fino al cielo ”.*



*“Por Dio
la homo
estas
la triumfo kaj la defio de la kreitaĵo;
li estas samtempe
maltrankvila kaj fiero.
De la lulilo ĝis la tombo
la vivo
estas paŝado
kiun nur la homo povas gajigi
aŭ
aridigi.
Li estas laborejo
de ideoj, de revoj, de spertoj
kuj dependas nur de li
eltiri la lecionojn
kiuj konsentos al li
leviĝi ĝis la ĉielo.*

Tale riflessione fece incidere Paul Valéry sul frontone del Palais de Chaillot.

È un pensiero laico, ma intriso dei valori specifici del Natale, quali il senso religioso della vita, l’attesa di un Redentore, la progettualità dell’esistenza.

Con i migliori Auguri.

Tiun prikonsideron gravurigis Paul Valéry sur la frontono de Palais de Chaillot.

Temas pri laika penso, sed trempita en la valoroj specifaj de Kristnasko, kiaj la religia sento de la vivo, la atendo de Elaĉetanto, projektigo de la ekzisto.

Kun la plej bonaj bondeziroj.

*Mons. Giovanni Balconi
Milano - S. Natale 2012*

(disegno di Padre Luigi Alfano)

Informoj el la lokaj grupoj

Rubrica a disposizione dei gruppi locali - Rubriko je dispono de la lokaj grupoj

MILANO

10 dicembre 2012: Ricorrenza della Dichiarazione Universale dei Diritti dell'Uomo.

Nel Salone degli Affreschi della Società Umanitaria, si è tenuto un convegno sui diritti umani promosso dal preside del Liceo milanese "Cremona", prof. Giorgio Bagnobianchi. Vi hanno partecipato circa 150 studenti e un gruppo di esperantisti. In questo convegno è stato presentato il libro "Pace per Vivere. Gandhi Einstein in Dialogo" (MC Editrice), che raccoglie teatralmente un dialogo immaginario tra Gandhi ed Einstein sui temi della non violenza e dei diritti umani. Il testo è stato tradotto in Esperanto da Ida Bossi. La MC Editrice, oltre che averci permesso di pub-



Milano: nel Salone degli affreschi della Società Umanitaria

blicare questa traduzione in rete^(*), ci ha autorizzato a stamparne un po' di copie da distribuire e ci ha chiesto di presentare in questo convegno la figura di Zamenhof con riferimento al tema della pace e dei diritti umani.

Tutti gli intervenuti e cioè, il dott. Piero Amos Nannini presidente della Società Umanitaria, il prof. Morris L. Ghezzi presidente della sezione Italiana della LIDU (Lega Internazionale dei Diritti Umani), la dott.ssa Tiziana Gardini presidente della sezione milanese della LIDU e la dr.ssa Michela Bianchi della MC-Editrice, hanno avuto parole di particolare apprezzamento per l'esperanto.


Giovanni Daminelli, che è stato presentato come presidente dell'IKUE, ha illustrato

la biografia di L.L. Zamenhof con particolare riferimento alla sua opera di pacificazione e di propugnatore dei diritti umani. Pierre Caliari presidente della IEJ ha letto in esperanto qualche passo delle opere di Zamenhof.

Alcuni studenti hanno declamato gli articoli della Dichiarazione Universale dei Diritti dell'Uomo e recitato il *Dialogo Gandhi-Einstein*. Gli articoli più significativi della Dichiarazione e le frasi più coinvolgenti del dialogo sono state ripetute in esperanto da Carla Sfarini.

Il discorso su Zamenhof e sull'esperanto è stato seguito con particolare attenzione e interesse data l'originalità del tema.

(Giovanni Daminelli)



^(*) <http://www.ueci.it/eldonoj/verkoj/GandhiEinstein.pdf>

Niaj kunvenoj en 2013

Bibliaj Tagoj - Strasburgo 13^a-17^a de Marto

Ĉi-jare la Bibliaj Tagoj organizitaj de Stefan Lepping okazos en Strasburgo, belega franca urbo ĉe la landlimo kun Germanio. La kunvenejo estos en la "Kultura Centro S-ta Tomaso" (*Centre Culturel Saint Thomas, 2 rue de la Carpe Haute, Strasbourg*). Temas pri eklezia renkontiĝo simila al tiu de la jaro 2012 en Trento. Dum la renkontiĝo oni primeditos bibliajn tekstojn, preĝos kune, ekskursos en la urbocentro. Oni povas elŝuti la aliĝilon kaj pluajn informojn el nia retejo: <http://www.ueci.it/aligxiloj/>. La Italoj pagas 30 eŭrojn por la aliĝo kaj 223 eŭrojn por la gastigado.




27^a Kongreso de UECI

Caprino Bergamasco 24^a-28^a de Majo

Kiel jam anoncite, nia kongreso okazos en provinco de Bergamo, ĉe la Kolegio Celana. La temoj estos: tiu religia, **Jaro de la Fido** kaj la kultura, **Edikto de Milano (313-2013)**. La kongresejo estas atingebla per la fervoja linio Bergamo - Lecco aŭ per aŭtoŝoseo A4 (Milano - Bergamo). En tiu kolegio studis interalie Angelo Giuseppe Roncalli, la estonta papo Johano 23a, kiu naskiĝis tie proksime. Pro tio ni vizitos urbon Bergamo kaj la lokojn de Papo Johano.

La aliĝkotizo estas kiel kutime 20 € por persono. Por la kvartaga pensio kaj ekskursoj: 220 € por unulita ĉambro kaj 200 € por dulita ĉambro. Por aliĝi oni povas plenigi kaj sendi la aldonitan aliĝilon aŭ aliĝi rekte per nia retejo: <http://www.ueci.it/aligxiloj/>. En nia retejo http://www.ueci.it/kongresoj/kng_2013.

leĝblas ĝisdatigitaj informoj. Por apartaj petoj telefonu aŭ skribu al Gianni Conti.



67^a Kongreso de IKUE - Kalwaria Zebrzydowska (PL)

13a-22a de Julio 2013



La kongresejo estas ĉe fama pilgrimloko en la regiono kie naskiĝis, kaj dum pluraj jaroj agis kiel sacerdoto, la estonta papo Johano Paŭlo la 2a. La temo de la kongreso, "**Nova evangelizado**", estas ligita kun la temo de la lasta episkopa sinodo kaj ties konkludoj. En la programo estas pilgrimoj al Krakow (*preĝejo de sankta Francisko, Sanktejo Łagiewniki, Wawel*), Auschwitz, Kęty, Wadowice (*naskiĝdomo de la beata Johano Paŭlo la 2-a*).

La aliĝilo kaj pluaj informoj pri la programo loĝado kaj kostoj k.t.p. estos baldaŭ diskonigataj ĉe la IKUE-retejo: <http://www.ikue.org>



NATALE 2012: URBI ET ORBI

Anche per questo Natale abbiamo ricevuto “*Urbi et Orbi*” gli auguri dal Santo Padre in esperanto. È ormai dal Natale 2001 che un gruppo di esperantisti, coordinati dal nostro Gianni Conti, si ritrova in P.za San Pietro a Natale e Pasqua con gli storici nove pannelli per mostrare al Papa e al Mondo che

ci siamo. Quest'anno come non mai, alla fine della cerimonia, numerose persone provenienti da diversi continenti si sono messe in fila per farsi fotografare accanto ai nostri pannelli. Agli occhi di molti, e come si vede anche per gli operatori televisivi, siamo ormai una tradizione.

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2013

(Attenzione l'iscrizione all'UECI è aumentata di un euro)

| | |
|--|---------|
| Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO) | 22,00 € |
| Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG) | 11,00 € |
| Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF) | 11,00 € |
| Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE) | 43,00 € |
| Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS) | 43,00 € |
| Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE) | 86,00 € |
| Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK) | 10,00 € |
| Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE) | 21,00 € |

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I* codice IBAN: IT66 076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco POLITI, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati

Mondoglobo

Ministeria inspektoro vizitas klasĉambro por kontroli la didaktiko ĉe la lernejo. Li demandas lernanton:

- Kial la akso de la mondoglobo ne estas vertikala?
- Ne estas mia kulpo, mi neniam tuŝis ĝin.

La inspektoro sin turnas al la instruisto:

- Kiel eblas, ke viaj lernantoj ne scias, kial la akso de la tergloba estas klinita?
- Ili pravas, ĝin oni donis al ni tia.

La inspektoro tuj kuras al la lernejestro:

- Kiel povas esti, ke en via lernejo, eĉ la instruisto ne scias, kial la akso de la mondoglobo estas obli-kva?
- Verdire, la kialo estas, ke ni aĉetis ĝin de la ĉinoj.

Malfruo

Kuracisto telefonas:

- Mi havas por vi unu bonan kaj unu malbonan novaĵon.
- Do diru unue la bonan.
- Laŭ la analizoj, restas al vi nur 24-hora vivo.
- Se tiu estas la bona, kio estas la malbona?
- Ke mi ne sukcesis telefoni al vi hieraŭ.

(sendis Dario Rodriguez)

Flegistinoj

Flegistino eniras kaj vekas malsanulon:

- Bonvolu vekigi, mi forgesis doni al vi la dormigilon.

Alia flegistino:

- Bonvolu ellitiĝi kaj fari dekon da saltetoj
- Kial?!
- Mi forgesis skui la medicinaĵon antaŭ la uzo.

Fenomena hundo

Sinjoro promenas kun sia hundo ĉe la lago-bordo. Iumomente li prenas pecon de ligno kaj ĵetas ĝin malproksimen en la akvon. Tuj la hundo kuras sur la akvosurfaco prenas la lignon kaj reportas ĝin al sia mastro.

La ĉeestantoj haltas kaj rigardas mirigitaj la scenon. Por montri la lertecon de sia hundo li reĵetas la pecon de

ligno en la akvon, kaj tuj la hundo kuras sur la akvo por preni kaj reporti ĝin al li. Post la tria fojo ke la hundo iras kaj revenas sur la akvo, iu ĉeestanto demandas la sinjoron:

- Kiom da jaroj aĝas via hundo?
- Kvar jarojn.
- Ho! Ĉu ĝi ankoraŭ ne lernis naĝi?

(sendis Ugo Tonini)

